

La babiladaj rondoj

okazas vendrede je la 19a horo.
La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (ĉefmanĝon kaj deserton).
La invititoj alportas nur trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens, la gastiganto preparas terpomojn kaj deserton. La gastoj alportas fromaĝojn, trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. La salono estas pagata el la kaso

Aliĝu perrete al unu aŭ al la alia grupo.

Ambaŭ babiladaj grupoj ĉe Dickens...

Ni tre bedaŭras, ĉar ne plu estas lokoj liberaj en ED venontmonate,
Ni do tiel devas nuligi tiun de la 16-a de marto kaj tiun de la 20-a de aprilo.

"Okcidenta grupo":

Ve, la 27-an de aprilo

ĉe François Randin

ch. de la Vallombreuse 14, Lausanne

076 411 14 55



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

"Orienta grupo":

Ve, la 13-an de aprilo

ĉe Marise Tissot

rte de St-Légier 20 A, Vevey

079 408 71 76



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

LA MAGIA LANDO : la filmado komencos sabate, la 28-an de aprilo. La venontaj datoj aperos ĉi-tie. En 2018, ni ne bazarumos.

Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE

+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

<https://www.facebook.com/esperantolausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc
Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -

Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Laŭzana Esperanto - Societo

Informilo

aprile 2018 - n° 04

Kunsidoj okazas monate
ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Lausanne

Lunde, la 9-an de aprilo 2018, je la 20-a
(atentu ne la 2-a ... Paska lundo)

Gramatikaĵoj



Ĉu vi konas ĉiujn regulojn de "nia" bona lingvo?
Certe ne. Ni ankoraŭ povas precizigi kelkajn
el ili ! Venu kun viaj demandoj. Ni provos
respondi al vi en bonhumora etoso.

⇒ Lunde la 7-an de majo
Prelego de David Buhlmann.

⇒ Sabate la 23-an de junio
Jara ekskurso en Morges
Programo troviĝos en la maja informilo.
Sed jam notu tiun daton !



La amikeco, samkiel la amo, estas
atentemi pri la alia.



Katherine Pancol, franca verkistino

Pasinta Kunsido

Dum la pasinta kunsido ni aŭskultis Sébastien Moret, kiu prelegis pri "Kial venkis esperanto?" La prelego estis france prezentita en UNESCO.

Tiu tre interesa kaj tre riĉe dokumentita parolado metis la akcenton sur la kvaliton de nia lingvo, kompare kun multe da aliaj provoj de universalaj lingvoj. Sébastien parolis speciale pri la simpla gramatiko de esperanto kaj pri ĝia fleksebleco adaptita al novajoĵ, konservante ĝiajn bazajn regulojn. La simpleco de la ortografio, la bazo de la radikaloj (el eŭropa kulturo) kaj la konstruado (el orienta menso) klarigas la sukceson de ĝia disvolviĝo.

Ĉiu povas esti fiera praktiki esperanton kaj konatigi ĝin!

Filmo "La Magia Lando"

La rikolto de mono por helpi la kreado de nia filmo, per www.kisskissbankbank.com ne atingis la atenditan sumon. La eŭropaj esperantistoj ne respondis al nia mendo ... bedaŭrinde. La 7 donacintoj retroe ricevos sian monon sen elspezo.

Male kaj bonŝanĉe, kelkaj svisoj kaj multaj membroj de LES sendis subtenaĵon rekte al nia poŝtĉekkonto. Ĝis nun, ni preskaŭ ricevis sFr 2000.-. Nia konto restas malfermita, do ĉiu kiu deziras, povas ankoraŭ subteni nian projekton, pere de CCP 10-26785-8, de la Laŭzana Esperanto Societo, (IBAN CH66 0900 0000 1002 6785 8). Grandegan dankon al ĉiuj.

Somere laŭzananoj kaj ĝenevanoj rolulos en *La Magia Lando*.



Tra Maigret al la homa naturo

De Sylvan Zaft, en Literatura Foiro n-ro 183, febr. 2000

Post kiam "Sezonoj" jam eldonis la unuan esperantan libron pri Sherlock Holmes, nun ĝi prezentas al ni la unuan pri Komisaro Maigret, la Pariza detektivo, kreita de Georges Simenon. La metodoj de tiuj du fikciaj detektivoj forte malsamas. Dum Holmes estas scienca kaj logika, Maigret plejparte uzas sian intuicion. En la Holmes-rakontoj la enigmo kaj ties solvo estas kernaj. En la Maigret-rakontoj la psikologio de la personoj estas eĉ pli grava. Plej ofte en la sepdekkelkaj Maigret-romanoj la Komisaro eniras apartan etoson, pri kiu komence li komprenas malmulte. Kutime murdo okazis kaj li vizitas kaj la lokojn, kie ofte troviĝis la murdito kaj la homojn, kiujn tiu konis. Iom post iom li komprenas la psikologion de la murdito kaj ties konatoj kaj finfine li komprenas, kiu lin mortigis kaj kial.

Tre bone Daniel Luez elektis traduki "Maigret hezitas". Tiu verko estas elstara psikologia romano. Kvankam mi antaŭe legis ĝin almenaŭ dufoje en la originalo franca, mi multe ĝuis tiun tradukon. Multaj de la detektivaj romanoj de Simenon valoras relegadon. Per relegado oni pli bone komprenas la psikologion de la personoj kaj pli profunde sentas la tragedion. Tiu tragedio ne nur estas tragedio de iu murdo sed plej ofte tragedio de tuta vivdaŭro aŭ pli precize de iuj vivodaŭroj.

Iun matenon Maigret ricevas sennoman leteron pri murdo okazonta. Estas facile - eĉ tro facile - malkovri la grandan luksan apartamenton, kie iu skribis la leteron. Kiam Maigret renkontas la dommastron (tiu estas fama, riĉa juristo, kiu laboras pri mara juro), li trovas tre malaltan viron, kiu ekscitiĝas renkonti la faman detektivon kaj kiu nur deziras diskuti sian plej ŝatatan temon, artikolo 64 de la Punkodo, kiu diras, ke delikto ne okazas, kiam la faranto de la ago estas en stato de frenezeco en la tempo de la ago, aŭ kiam li estis devigita per forto, al kiu li ne povis rezisti.

Daŭrigo en la venonta informilo